# *La mirinda sinofero de la kubaj sanitaraj laboristoj.*



**Renkonti?o kun gvidantoj kaj specialistoj de Minsap . Foto: Prensa Latina.**

Havano, feb 20 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel kaj la ?efministro Manuel Marrero, agnoskis la sinoferon de la laboristoj de la sanitara sektoro dum la jaro 2020.

Dum renkonti?o kun gvidantoj kaj specialistoj de la ministerio de publika sano (Minsap) por pritaksi la laboron faritan kaj re?i la prioritatojn kaj agojn de la nuna jaro, la ?tatestrods emfazis ke la kubaj sanlaboristoj devis duobligi klopodojn por fronti la Kovim-19; kaj alokis ili altisi la servo-kvalitojn.

La prezidento anka? esprimis ke la pandemio evidentigis kion la socialista sistemo povas fari, inkluzive la forton de la landaj proceduroj por preventi kaj kontroli la malsanon, kio kondukis al pli bonaj rezultoj ol la monda avera?o kaj kelkaj evoluintaj landoj.

Tamen, li esprimis, ni ne povas kontenti?i pri la farita laboro, sed male, ni devas labori en la malfortaj aspektoj ankora? ekzistantaj.

La ?tatestro esprimis ke inter la prioritatoj kaj defioj de la ministerio estas la epidemia kontrolo , la starigo de la Ordiga Tasko kaj altigo de la kvalito de servoj en la baza sansistemo kaj hospitaloj samkiel ?enerale plibonigi la atento al pacientoj.

La plej granda defio de la lando estas eliri el la pandemio, asertis la ?tatestro, kiu anka? pritraktis la laboron en la prioritataj programoj kiel la infan-patrina programo, la atento al nefekundaj paroj, la kuracisto kaj la flegistino de la familio kaj la internacia kunlaboro.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/248328-la-mirinda-sinofero-de-la-kubaj-sanitaraj-laboristoj

**Radio Habana Cuba**